BEL informas

n-ro 12/2014

la 6an de majo 2014

6 de maio de 2014

BEL havas novan kunlaborantinon

BEL tem nova colaboradora

Por plibone priservi siajn anojn, BEL ĵus kontraktis la funkciulinon Fabíola Carvalho por labori dum la komerca horaro ĉe la administra kaj financa sektoro (de la 9-a ĝis la 17-a horo, de lundo ĝis vendredo, kaj de la 9-a ĝis 13-a horo, sabate). La celo estas kontribui al la plibonigo de la servoj de BEL, antaŭe plenumitaj nur de sindediĉaj voluntuloj, kies partopreno, kiel sciite, dependas de la tempodispono de ĉiu unuopulo.

Nun en BEL-sidejo tamen tiu funkciulo ankaŭ zorgas pri la akceptado de vizitantoj kaj respondo al telefonalvokoj. Fabíola esta junulino enuziasme ligata al Esperanto, kun intermedia lingvonivelo kaj sufiĉe bonaj konoj pri informadiko adekvata al la posteno. Ŝi estis elektita el pluraj kandidatoj en ĵusa dung-anonco fare de BEL en la ĉefa brazilja ĵurnalo. Ni varme bonvenigas al Fabíola!

BEL

Para melhor atender seus associados, a BEL acaba de contratar a funcionária Fabíola Carvalho para trabalhar nas áreas administrativa e financeira (de segunda a sexta-feira de 9h às 17h e aos sábados de 9h às 13h), contribuindo para a melhoria dos serviços da Liga, que eram desempenhados unicamente por dedicados voluntários, cuja participação, como sabemos, fica a critério da disponibilidade de tempo de cada um.

Agora, na sede da BEL a funcionária cuida também da recepção de visitantes e do atendimento de telefonemas. Fabíola é uma jovem entusiasta do Esperanto, com nível intermediário e conhecimentos de informática adequados ao cargo. Foi selecionada entre diversos candidatos em recente anúncio de contratação feito pela BEL no principal jornal de Brasília. Damos as boas-vindas à Fabíola!

BEL

Daŭre pri Floripo: Gratulsaluto al la LKK de la 49-a BKE fare de LBV

Ainda sobre Floripa: Congratulações ao LKK do 49º BKE feitas pela LBV

LBV ĝentile raportis pri nia 49-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta glate kaj sukcese en la belega Florianopolo, en la ŝtato Sankta Katarino, kalkulinte je la partopreno de dekoj da esperantistaj organizoj kaj reprezentacioj de Brazilo kaj ankaŭ de aliaj landoj.

En la kongresejo estis ankaŭ la budo de Legio de Bona Volo, LBV, ĉe kiu oni oferis al la partoprenantoj kaj vizitantoj de la renkontiĝo informaterialon kiel revuoj kaj faldfolioj kaj en Esperanto kaj en la portugala lingvo, ĉiam instigante al la lernado de la lingvo Esperanto kaj disvastigante ĝian mesaĝon pri paco kaj pri la kompreno inter ĉiuj, sendepende de raciaj, filozofiaj aŭ religiaj originoj, en tre harmonia etoso, kun granda respekto kaj amikeco al ĉiuj.

A LBV gentilmente relatou sobre nosso 49º Congresso Brasileiro de Esperanto (BKE), muito bem sucedido na bela capital catarinense, e que contou com a participação de dezenas de organizações esperantistas e representações tanto do Brasil quanto de muitos outros
países.

Nosso congresso recebeu também a presença da LBV, com seu stand, que ofereceu aos presentes material informativo, em Esperanto e em Português, incentivando a difusão e aprendizado da língua e propagando a mensagem de paz e da compreensão entre todos,
indistintamente de origens raciais, filosóficas ou religiosas, num ambiente de harmonia, amizade e respeito por todos.

Belegajn fotojn kaj pli da informo pri tio bonvolu vidi ĉe:

Leia mais e veja algumas belas fotos do congresso:

www.boavontade.com/eo/esperanto/lbv-partoprenas-en-evento-de-la-e-movado-en-florianopolo

LBV

LBV

70-a IJK: Vatzap-Eksperimento!

70º IJK: Experiência Whatsapp!

Ĉu vi volas konatiĝi kaj babili kun la partoprenontoj de la 70-a IJK eĉ antaŭ la kongreso? Sub la temo “Esperanto kaj teknologio: iloj por senbara interhoma konekto tra la mondo”, IJK realigas la jenan eksperimenton: kunigi la partoprenontojn en vatzap-grupo, kie pluraj jam partoprenas kaj babilas.

La eksperimento estas parto el la “novula programo”, do novuloj havas prioritatan partoprenon, ĉar la grupo havas limon de 50 partoprenantoj. Por esti aldonita al la grupo, retmesaĝu per la temo Whatsapp al bejoesperanto@gmail.com . Nia BEJO-sekretariino, Anna Lobo, gvidas tiun agon.

BEJO/IJK-LKK

Quer conhecer e conversar com os participantes do 70º IJK antes mesmo do congresso? Sob o tema “Esperanto e tecnologia: ferramentas para uma conexão interpessoal sem barreiras pelo mundo”, o IJK está fazendo o seguinte experimento: reunindo os participantes em um grupo do Whatsapp, onde muitos já participam e conversam.

A experiência faz parte do “novula programo”, então novatos têm a preferência, pois o grupo conta com limite de 50 participantes. Para ser adicionado ao grupo, envie e-mail com o assunto Whatsapp para bejoesperanto@gmail.com . A secretária da BEJO, Anna Lobo, coordena esta ação.

BEJO/IJK-LKK

Braziljo: Gratulon, ABE!

Brazilja Esperanto-Asocio (pli konata kiel ABE en la portugala) kompletis 52 jarojn da ekzisto. Gratulon al sia anaro kaj estraro, kiuj per senegala strebo antaŭenigas la idealojn de ĝiaj fondintoj.

Brasília: Parabéns, ABE!

A Associação Brasiliense de Esperanto completou 52 de existência. Parabéns aos seus associados e diretores, que com esforços inauditos levam à frente os ideais dos seus fundadores.

BEL kaj Carlos Maria Prezidanto de la Tagvatinga Esperanto-Klubo

BEL e Carlos Maria
Presidente do Taguatinga

São José do Rio Preto: nova E-kurso

Esperanto-Klubo São José do Rio Preto: novo curso de Esperanto

Leandro Freitas

Leandro Freitas

***Nota**: no último BI, na versão em Português da carta de Ivan Colling sobre Geraldo Mattos, onde se lê "professor emérito", leia-se "professor titular". O termo "emerita", do Esperanto, significa "aposentado". Em Português, é um título concedido a alguns professores. Conforme nosso conhecimento, Mattos nunca recebeu tal título. No ato da revisão, alteramos sem intenção o original de Ivan Colling, por isso esta nota.*

Atenton! BEL Informas volas scii: kiuj estas niaj venontaj eventoj?

Sennombro da eventoj okazas en Brazilo dum la tuta jaro. Parto de la misio de **Brazila Esperanto-Ligo** estas ilin disvastigi al ĉiuj, kaj ***BEL Informas*** estas komunikservo je la dispono de nia tuta komunumo. Sendu al ni novaĵojn pri eventoj en via regiono - miloj da

Atenção! O BEL Informas quer saber: quais são nossos próximos eventos?

São inúmeros os eventos de Esperanto no Brasil durante todo o ano. Uma das missões da **Liga Brasileira de Esperanto** é divulgá-los, e o ***BEL Informas*** é um serviço que está à disposição de toda a comunidade. Contenos de eventos em sua região - milhares

homoj scios pri ili kaj igos ilin sukcesaj pere de nia ***BEL Informas***.

Ni atendas viajn informojn!

poderão inteirar-se deles e garantir seu sucesso com nosso ***BEL Informas***.

Estamos aguardando!

Klaku ĉi tie por scii kiel sendi viajn novaĵojn.

Teamo de BEL Informas

Clique aqui para saber como enviar suas novidades.

Equipe BEL Informas

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Ne forgesu nian ĉiutagan taskon: malkovrigi Esperanton

Não esqueça de nossa tarefa diária: fazer descobrir o Esperanto

Restas ankoraŭ ekzempleroj de la bela broŝuro **DESCUBRA O ESPERANTO,** kiun vi povas uzi en via grava ĉiutaga tasko diskonigi
Esperanton!

Memoru! La prezo de la grava libreto estas nur R$ 1,30!

Ainda temos exemplares da bela brochura **DESCUBRA O ESPERANTO**, para você usar na sua tarefa diária de divulgar o Esperanto.

Lembre-se! O preço da importante brochura é de apenas R$ 1,30!

belabutiko.esperanto.org.br/index.php/descubra-o-esperanto.html

Denove disponeblas en via BEL@Butiko:

Disponibilizamos novamente em sua BEL@Butiko:

La alienisto
La deveno de Esperanto
Gerda malaperis!
Hetajro dancas
La morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko
La profeto

NOVAĴOJ	NOVIDADES

La esperanta vortkonsisto
La participo - Teorio kaj praktiko
Sed homoj kun homoj
Fakaj studoj en Esperanto
Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo
Esperanto kaj aliaj lingvoj - kontrastlingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj

AL BEL-MEMBROJ:
POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

AOS MEMBROS DA BEL:
PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SUA SENHA JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon: | **Visite a sua loja virtual:**

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto
Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu kontribuojn al bel.informas@gmail.com

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel